NIA PONTO

Grupo Esperantista
Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre
E-48005-BILBAO (Hispanio)
Redaktas: Jesús-Miguel García Iturrioz

Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)
☎: 944.164.492
☎ portebla: 696.613.958
💻: tepgaitj@lg.ehu.es

Jar-kotizoj: Normala: 17 €. Speciala: 14 €. Familia: 30 €.
BBK-konto: 2095-0141-41-2218001550

JANUARO/FEBRUARO 2003

ĈIUJARA ĜENERALA KUNVENO.

Laŭ postulas la statutoj de nia asocio, ni kunvokas ĉiujn ĝiajn anojn partopreni la ordinaran ĝeneralan kunvenon, kiu okazos la **vendredon 7an de marto**, je la 19 h. (unua alvoko), aŭ **je la 19,30 h.** (dua alvoko) laŭ la ĉi suba tagordo:

1.- Aprobo, se estas konsento, de la aktoj de la lasta Ĝenerala Kunsido (2002).
2.- Prezento de la ekonomia stato de la Grupo: el- kaj enspezoj dum 2002.
3.- Prezento kaj aprobo, se estas konsento, de la buĝeto por la venonta jaro.
4.- Informo de la ĉesanta estraro pri ĝia agado dum la lastaj du jaroj.
5.- Ebla okazigo en Bilbao de la Eŭrop-Unia E-Kongreso en 2004.
6.- Elekto de nova estraro.
7.- Demandoj kaj sugestoj.

Ni speciale alvokas ĉiujn asocianojn partopreni la kunsidon, tial ke ĝi estos aparte decida precipe pro la punktoj 5 kaj 6. Ni samtempe invitas ĉiujn asocianojn prezenti kandidatojn (aŭ sin prezenti) pór la nova estraro laboronta dum la venontaj du jaroj. Memoru, ke la bon-farto kaj sorto de nia klubo, kaj sekve de la Esperanto-movado en nia provinco, dependas last-instance de niaj homaj fortoj. La gravaj defioj, kiujn probable ni surprenos por la tuj baldaŭaj tempoj meritas ja seriozan pristudon kaj ne malpli respondecan respondon far ni ĉiuj.

RECUERDA: El viernes 7 de Marzo, Asamblea General, a las 19,30 h.

Ne forgesu ke ni kunvenas, ĉiuvendrede, de la 7a kaj duono ĝis la 9a vespere ĉe nia klubejo de Barrencalle Barrena. Lastatempe, malmulte da niaj anoj vizitas nin. Estas ĉies tasko revivligi la asocian vivon, do ne atendu ke aliaj laboru favore al vi; venu al la Grupejo: vi praktikos Esperanton, renkontos geamikojn, havos la eblon pruntepreni librojn kaj revuojn, ricevos informojn pri E-renkontiĝoj kaj pri planitaj vojaĝoj, ...

No olvides que todos los viernes, de 7,30 a 9, nos reunimos en el Grupo. Esperamos tu asistencia, pues es asunto de todos el mantenerlo. La próxima asamblea general es una buena ocasión para volver a él.

NIA SOCIARO.

Dum la jaro 2002, estis nek aliĝoj nek eksiĝoj, do la 31an de decembro, nia E-Grupo nombris 76 anojn.

COBRO DE CUOTAS 2003.

Según se decidió en la pasada Junta General, las cuotas de socio para el presente año 2003 no sufren ninguna subida, por lo que siguen siendo las siguientes:

Cuota normal: **17 euros**.
Cuota reducida (jubilados, estudiantes, parados, ...): **14 euros**.
Cuota familiar (común para todos los residentes en un mismo domicilio): **30 euros**.

Nº de cuenta en la BBK: **2095-0141-41-2218001550**

No necesitamos recordar que el pronto pago de las cuotas redunda en un mejor funcionamiento del Grupo. A aquéllos que la tienen domiciliada a través de la BBK, se les pasará al cobro en los próximos días. **A quiénes aún no la tienen domiciliada, les rogamos que nos den un número de cuenta en la BBK para facilitar los cobros**. Muchas gracias por vuestra colaboración.

INTERVJUO.

La 20an de januaro, "Radio Economía", kies sidejo troviĝas en Mungia (Vizcaya) intervjuis al la vicsekretario de HEF, Marcos Cruz.

Z-TAGO.

Kiel kutime, la 14an de decembro, ni festis la naskiĝdatrevenon de la kreinto de Esperanto. Danke al la streboj de nia amiko Sabin Orueta, eblis, per komputilo, paroli kun esperantisto el Aŭstralio kaj esperantistino el Rumanio. Voĉoj alvenis tute klaraj kaj la kosto estis la sama ol enurba telefona interparolado.

Post tio, ni sidis ĉirkaŭ tablo kaj daŭrigis la babiladon pri diversaj aferoj dum gustumis la manĝaĵoj$_n$ kaj trinkaĵoj$_n$ alportitaj de la ĉeestantoj.

La etoso estis vere alloga; nur ni bedaŭris la malmultnombra ĉeesto de niaj asocianoj.

FONDO DE GRUPO SAT-EN-HISPANIO.

La 14an de decembro okazis en Madrido la fonda kunveno de nova asocio, sub la nomo "Asocio Maldekstro kaj Esperanto SATEH (SAT-en-Hispanio)". Ĝiaj celoj estas "efektivigi la principojn kaj celojn de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) en la Hispana Regno".

Somere, dum la HEF-kongreso de Valencio, okazos la unua Ĝenerala Asembleo de la nova asocio; dume, estis nomumita provizora estraro. Jen ĝi:

Prezidanto:	Manolo Parra
Sekretario:	Toño del Barrio
Kasisto:	Pedro Hernández

La kotizo por la jaro 2003 estos nur 5 eŭroj. Tiuj, kiuj interesiĝas pri la afero, povas peti pliajn informojn ĉe nia grupejo.

BANKROTIS MONDA TURISMO.

La 22an de septembro 2002 okazis la 13a eksterordinara Ĝenerala Kunveno de "*Monda Turismo*", dum kiu oni decidis, pro ekonomiaj kialoj, dissolvi la asocion. Samtage oni fondis novan Internacian Klubon "*Esperantotur*", kiu daŭrigos la turisman agadon de Monda Turismo.

(Revuo "Esperanto". N-ro. 1154 (12). Decembro 2002).

LASTA NUMERO DE "EVENTOJ".

Fine de decembro 2002 aperis la lasta numero de "Eventoj", "internacia gazeto pri la Esperanto-movado". Lia redaktoro, László Szilvási, en la adiaŭaj vortoj, rememoras pri tio ke "antaŭ 11 jaroj ni entreprenis realigi la plej oftan Esperantan gazeton. Rapide Eventoj iĝis ne nur internacie konata, sed ankaŭ eĉ rekonata kaj prestiĝa". La kvanto de abonantoj variis inter 1000 kaj 1500 el 60-72 landoj. La unua numero aperis la 2an de marto en 1992. (...) Tamen ni ne deklaras ĝian definitivan ĉeson: se la cirkonstancoj estos favoraj, eble iam ni revivigos ĝin. Do dankojn pro via pli ol 10-jara helpo, subteno, kunlaboro, eltenemo. Adiaŭ (aŭ eble ĝis revido!)".

VORTARO DE FERNANDO DE DIEGO.

Kiel jam anoncite en la antaŭa "Nia Ponto", oni intencas eldoni la Grandan Vortaron Hispana-Esperanto, de Fernando de Diego. Tiu verko estas unu el la plej gravaj produktitaj en nia movado de antaŭ multe da jaroj, kaj ĝi ampleksos pli ol PIV; enhavas 50.000 enirvortojn, kun klarigoj, frazoj, ekzemploj, ktp.

Oni planas prezenti ĝin al la publiko la 15an de julio 2003 en Valencio, okaze de la 62ª Hispana Kongreso. Ĝia fina prezo estos nur 45 eŭroj. Tamen, se vi antaŭmendus ĝin la prezo estus 30 eŭroj!, plus sendokosto.

Se vi deziras jam antaŭmendi tiun verkon kaj ŝpari iom da mono, nur devas enkontigi 33 eŭrojn en la konto de la E-Grupo de Bilbao (BBK **2095-0141-41-2218001550**). Kiel kutime, Iñaki Vélez okupiĝos pri la afero.

EŬROPA KONGRESO EN BILBAO EN 2004.

Kiel vi povis legi en nia unua paĝo, unu el la punktoj de la ĉijara ĝenerala asembleo estas la organizado de de la 6a Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso, kiu okazos en Bilbao en la jaro 2004. Estas ege grava evento, kiu disvastigos la vorton "Esperanto" tra nia urbo kaj tra la tuta Eŭskio/Vaskio.

Ni jam starigis la unuajn kontaktojn kun la brusela oficejo kaj, ĉefe, kun David Ferguson, Ĝenerala Sekretario, kaj Marko Naoki, responsulo de la brusela komunikad-centro. Ankaŭ estas skizita la provizora programo, antaŭvidita la kongresejo, ...

Kio mankas?: via helpo; la vendredojn vespere ni kunvenas kaj antaŭplanas la agadojn. Diversaj homoj el Hispanio kaj el eksterlando sin oferis por kia ajn laboro. Cxu eblas ke preskaŭ neniu bilbaoano helpos en la plenumado de tiu tasko mendita al ni de la eŭropaj E-instancoj?. **Ni atendas vin ĉiujn**.